

Espero

Katolika

REVUO MONATA EN ESPERANTO

(Honorata per apostola Beno de Pio X-a, 27-an de Jun. 1906.)

RELIGIO. — FILOZOFIO. — HISTORIO. — SOCIOLOGIO
LITERATURO. — ARTO

REVUO DE REVUOJ. — BIOBLOGRAFIO. — ŜAKOJ

« Unum ovile et unus pastor. » (Joh. X, 16.) « Unu ŝafaro kaj unu paŝtanta. »

ABONEJOJ de E. K.

- FRANCLANDO { Ĉe la Direktoro de E. K.
Ĉe la Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépède, PARIS, V°
Ĉe libejo Warnier kaj K°, 15, rue Montmartre, PARIS.
- ANGLOLANDO { S-o O. Connor, 17, St-Stephen's Square, Bayswater, LONDON
British Esperanto Association, 13, Arundel Street, Strand,
LONDON, W. C.
- BELGLANDO : S-o P. Mattelaer, Woorstraat, 50, COURTRAI.
- BOHEMUJO-AŬSTRIO : F. Topič. libr. Ferdinandova 9, PRAĜA.
- ĈILILANDO : S-o Luis E. Sepulveda Cuadra, Casilla 1679, SANTIAGO-CHILI.
- HOLANDUJO : S-o H. B. van ZWET, Heerenweg, 51 bis, UTRECHT.
- HUNGARLANDO : S-o Endre Varju IV, Kigyo, U. 62. em. 14, BUDAPESTO.
- ITALLANDO : S-o Jakobo Bianchini, S. Vito al Tagliamento (*Udine*).
- HISPANLANDO : S-o Ant. Guinart, Escuelas Pias, VALENCIA.
- GERMANLANDO : Moller et Borel, 95, Prinzenstr, BERLIN.
- LITOVUJO : P-o A. Dombrovski, en KOVNO.
- NOVA ZELANDO : S-o A. J. Burgess, libr. Devon Street, NEW PLYMOUTH
(New Zealand).
- POLUJO : Arct. libr. Nowy Swiat, 53, WARSZAWIA.
- RUSLANDO : Societo Espero, Bol. Podjačeskaja, 24. loĝ. 12. S. PETER-
BURGO.
- ŜVISLANDO : Libejo Garin, 20, rue Corraterie, GENEVO.

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO

Ĉe la Direktoro : P-o Em. PELTIER
Sainte-Radegonde (Indre-et-Loire) France

Manuskriptoj kaj leteroj pri E. K. estu sendataj nur al la Direktoro.
— Manuskriptoj neniam estos resendataj.

Ĉiuj verkistoj estas persone respondaj pri siaj artikoloj. La Revuo estas responda nur pri artikoloj subskribitaj de la Direktoro. — E. K. estas malfermata por ĉiuj personoj kaj por ĉiuj demandoj (escepte la politikaj).

KONDIĈOJ DE ABONO

Abono jara	} En Francando : 4 frankoj. (1 Sm. 60). Ekster — 5 fr. (2 Sm.)		Unu numero :
			0 fr. 50, afrankite, (20 Sd.).

Abonoj estas akceptataj nur por tuta jaro. Komencaj datoj oktobro, januaro aŭ marto. La Revuo ne aperas en aŭgusto nek en septembro. Poŝtmarkoj estas akceptataj por efektiva valoro.

La koloro de l'adresaj etiketoj indikas la komencon de l'abono : blanka, de oktobro; flava, de januaro; verda, de marto.

Anoncoj. — Tuta paĝo kostos 40 frankojn; — duona paĝo : 25 fr.; — 4^a paĝo : 15 fr.; — 8^a paĝo : 9 fr.; — 16^a paĝo : 5 fr. Por anoncoj ripetitaj, rabatoj : Por anonci en E. K., sin turni al S-o G. Warnier, 15, rue Montmartre, Paris.

MUSIKAĴOJ DE S-INO JOSÉE GUIVY

Ho Mia Kor', poezio de D-ro Zamenof.	1 fr.
En Songo, poezio de D-ro Zamenhof.	1 fr. 60
Birdoj, Forflugu, poezio el <i>Flandra Literaturo</i> .	1 fr. 60
La du Muloj, fablo de La Fontaine.	1 fr. 60
Himno, poezio de P-o A. Dombrovski.	1 fr. 25

PLENA KOLEKTO DE ESPERO KATOLIKA

(1-a j., — 2-a j., kaj 5 n-oj de la 3-a jaro). Ĉiu jaro : 2 fr. (dek kajeroj da 88 paĝ.) Duono de la 3-a jaro (ĝis marto 1906) 1 fr. — (La tuta kolekto ĝis marto 1906 : 5 fr. afrankite). Artikoloj legindaj en la kolekto : Fremduloj (E. Peltier). Spiritoj larĝaj (E. Peltier), Greka skismo (V. E.). Sidi-Lakdar kaj lia lernanto (A. Thill). Objektiva kriterio de poezio (A. Dombrovski). Animo en malliberejo (Prof. Louis Arnould). François Coppée; skizo; ekstraktoj (E. Peltier). Ŝaklecioj por lernantoj. Diversaj artikoloj literaturaj, lingvaj; kaj informoj pri la I-a Kongreso Esperantista. Raporto historia pri la 2 unuajn jar. de E. K., ktp. ktp.

BIBLIOTEKO DE E. K.

Kato kun botoj (luksa eldono, 6 ilustr.).	0 fr. 50
Cindrulino (sama kolekto, 6 ilustr.).	0 fr. 50
(La du verkoj kune mandataj 0 fr. 75)	
La Katolikaj Esperantistoj ĉe la II ^a Kongreso de Esperanto en Genevo (1906). Plena raporto, kun la prediko de P-o Em. Peltier.	0 fr. 15
Esperanto?... Qu'est-ce?... Franca broŝur. propag.	0 fr. 10

ESPERO KATOLIKA

Honorata per apostola beno de P^{IO} X^a
la 27-an de Jun. 1906.

ARTIKOLARO

Programo de la katolikaj Kunvenoj, ĉe la 3-a Kongreso .	289
La estonto de l'Katolikismo en Francujo (de Prelato Batiffol). Trad. P. DESCHAMPS	297
Kaukazaj legendoj (de Orskij). — Trad. D-ro A.-M. GRUN- FELD	303
La Kristimado. — La Vorto. — (Poezioj de A. DOMBROVSKI).	304
Komentario pri la <i>Preĝaro</i>	305
Imitado de Jesu-Kristo: Ĉapitro I-a	306
Himno Paska (Trad. GHISLENO C.).	309
La Juna Knabino surprizita de la Maro (Tr. ELEDA).	310
La homa Vivo (el Bossuet). — Trad. VINKO) .	311
Paĝo de l'Direktoro	312
Propaganda Kroniko inter katolikoj (Em. P. kaj L. MILHO).	314
Universala Komunikilo .	315
Abonmonoj ricevitaj.	315
Bibliografia Kroniko (E. LIME)	315
Ŝakoj	319

PROGRAMO DE LA KATOLIKAJ KONVENOJ ĈE LA III-A KONGRESSO

La nuna stato de mia sano ne permesas al mi ĉeesti la Trian Kongreson. La Katolikaj Esperantistoj estas petataj turni sin tutkonfide de P-o Richardson, sekretario de la katolika Komitato, pri informoj kaj ĉiuj aferoj koncerne la katolikaj kunvenoj.

P-o Richardson loĝos dum la Kongreso (de la sabato 10-a, je la 2-a h.) ĉe S-ino Woods, 35, Trumpington Street, Cambridge.
Em. PELTIER.

Dimanĉon 11-an de Aŭg. — Je 9 h. 30, meso speciala por la katolikaj Esperantistoj, kun prediko kaj kantoj en Esperanto.

Ĉiutage, oni faros frumatene kelkajn mesojn por la Esperantistoj. La horoj estos anoncataj dum la dimanĉa meso. Post ĉiuj mesoj, la Pastro kune kun fideluloj diros, laŭte kaj *Esperante*, la preĝojn ordonatajn, kiujn oni ordinare diras en nacia lingvo.

La 15-an de aŭg., festo de l'Asumcio de Beata V. Mario, je 8 h. 30, meso speciala por la katolikaj Esperantistoj, por kiuj ĉeesto al la meso estas deviga en tiu tago. Espereble oni aŭdos ankaŭ kantojn en Esperanto, dum tiu meso.

Nomo de la katolika Preĝejo estas *Church of our Lady and the English Martyrs* (Preĝejo de nia Sinjorino kaj de la Anglaj martiroj). Ĝi kuŝas en *Hyde Park Corner*, ĉirkaŭ unu mejlo malproksime de la Stacidomo. Estas tramveturilo de la stacidomo ĝis la Preĝejo.

LA MESO

PROGRAMO DE LA KANTOJ

Aŭskultu, ho! anim'.

(Kantota komence de la meso.)

Tiu kanto estas traduko de angla Himno *Hark! hark! my soul*, verkita de Father Faber, Estro de la London'a *Oratorio*. Ĝi estas tre populara en London'; kaj la ario estas tre konata en Francujo. La traduko esperanta estas farita de S-o Bicknell, unu el niaj plej bonaj poetoj Esperantistaj.

1. Aŭskultu, ho! anim', la anĝelar' flugas
Tra la verda ter' kaj tra l'muĝanta mar'
Per tre dolĉa voĉ' ilia ĥor' kantadas
Pri la nova viv' estonta sen pekar'.

Ho! de Jesu' la brila anĝelar'
Benon alportas al noktopilgrimar'! (*bis.*)

2. Antaŭen iras ni, kaj ili nin admonas;
« Venu, senfortul', Jesu alvokas vin »;

Tiam melodi' Evangelia sonas
 Ĝis el noktmallum' ĝi hejm' kondukas nin.
 Ho ! de Jesu, k. c.

3. Jen, kiel malproksim' sonorileg' vespera.
 Lia voĉ' aŭdiĝas tra la ter' kaj mer' ;
 Tre humile venas al Paŝtisto vera
 Miloj da animoj, laca pekular' !
 Ho ! de Jesu, k. c.

4. Dolĉega ripozej' post vivo longa, laca.
 Jen forflugas nokt' : ekbrilos'la maten' !
 Post vojaĝ' fidema, estos fino paca
 En ĉiela hejm', la vera kor-haven' !
 Ho ! de Jesu, k. c.

5. Ekkantu vi anĝel', gardante nin fidele,
 Iom, ho ! kantadu de l'ĉiel' kantar'.
 Post la ploro-nokt' naskiĝos tago bele,
 Kaj sennuba Amo post la viv-ombrar'.
 Ho ! de Jesu, k. c.

Sene estas ĥoro, S-ino Guivy kaj D-ro Grodvolle kantos kelkajn strofojn de la bela Preĝo al Mario, tradukita de S-o Schröder (Vidu *Espero Katolika* maja) muziko de S-ino Guivy.

Dum la Ofertorio : « Milfoje, ho feliĉa », el la bela tragedio *Athali*, tradukita de D-ro Noël; kantota de S-ino Guivy kaj F-ino Perrin. — Muziko de Mendelssohn.

Dum Pater Noster, aŭdiĝos la valora verko de S-o Gothardo-Krenn, fama komponisto Wien'a : *Patro Nia* por kvar voĉoj.

Post la komuniĝo, estos kantata la *Himno*, de Dombrovski, muziko de S-ino Guivy. Tiu ĉi devas esti nia katolik-Esperantista Himno, kaj ni devas kanti ĝin ĉe ĉiuj kongresaj mesoj. Jam multaj Esperantistoj konas la arion.

PREĜOJ POST LA MESO

Saluton, Mario... (*trifoje*).

Saluton, Reĝino, patrino de mizerikordo, vivo, dolĉeco kaj espero nia, saluton! Ekzilitaj idoj de Eva, ni petegas al vi, ni sopiras al vi, ĝemantaj kaj plorantaj sur tiu ĉi valo de larmoj. Ho vi, defendantino nia, nin do ekrigardu kun kompatemaj okuloj, kaj, post nia nuna ekzilo, faru ke ni vidu Jesu'on la gloregatan frukton de via korpo, ho klemenca, ho pia, ho dolĉa virga Mario.

ŝ. Preĝu por ni, Sankta naskintino de Dio.

ĝ. Por ke ni fariĝu indaj de la promesoj de Kristo.

Ni preĝu. — Dio, nia rifuĝo kaj forto, favore rigardu popolon al vi petegantan, kaj akceptu la propeton de la glora kaj nemakulita Virga Mario, naskintino de Dio, kaj tiun de la beata Jozefo, de l'beataj Apostoloj Petro kaj Paŭlo, kaj de ĉiuj Sanktuloj. Preĝojn al vi ni faras por la konvertiĝo de la pekuloj, por la liberiĝo kaj la plialtiĝo de nia sankta patrino la Eklezio. Tiujn preĝojn bonvolu mizerikorde kaj kompateme elaŭdi. Per Kristo Sinjoro Nia. Amen.

Sankta Mikaelo Ĉefanĝelo, defendu nin en la batalado. Estu nia antaŭgardanto kontraŭ la kaptuloj kaj insidoj de la diablo. Ĉi tiu restu senpova kontraŭ Dio, tion ni humile petegas. Kaj vi, Estro de la ĉiela armeo, kontraŭstaru Satanon kaj la aliajn malbonajn Spiritojn, kiuj trakuradas la mondon por perdi la animojn, kaj per la potenco de Dio, ilin forpuŝu en inferon.

(*Tiuj ĉi preĝoj, se ilin oni diros surgenue kaj alterne kun la pastro, estas riĉigitaj per indulgenco da 300 tagoj.*)

Sanktega Koro de Jesu, kompatadu al ni. (*Trifoje.*)

ĜENERALA KUNVENO DE KATOLIKOJ

I. — *Projekto de Koperativa Societo, por la propagando de Katolika Vero per Esperanto.*

Kio estas *Koperativo*? Ĝi estas societo kunhelpa kies membroj unuiĝas por aĉeti pogrande la aferojn

(ĝenerale, nutraĵojn) kiujn ili bezonas. Per tiu unuiĝo ili havigas al si bonkvalitajn komercaĵojn, kaj evitas pagi profitojn al peruloj.

Mi longe pripensis kiamaniere mi povus krei societon similan al la Angla Societo de Katolika Vero (Vidu Junian N-on de *Espero Katolika*, p. 260). Unue mi intencis krei societon internacian, kun jara kotizaĵo, kaj internacia Komitato. Sed tia Societo estas ĉiam pezega maŝino, mal-facile movigebla, postulanta longan tempon por bone funkciadi.

Ĉar la celo de la Societo estas eldoni librojn kaj broŝurojn, oni devus atendi ĝis kiam la nombro de la Societanoj estus sufiĉe granda por ke la Societo povus pagi la elspezojn de presado.

Per la kooperativa Societo, kiun mi proponas (laŭ la plano de la kooperativaj societoj de aĉetantoj pri nutraĵoj), la afero fariĝas tute simpla kaj tre profitdona por la societanoj : iamaniere ili aĉetos *po-grande*, kaj ili evitos pagi la profitojn necese donotajn de la po-granda vendisto al la peruloj. Jen skizo de la projekto, kiu estos pridiskutata dum la ĝenerala kunveno de katolikoj, en Cambridge

SOCIETO SANKTA PAULO

« Sancte Paule Apostole, prædicator veritatis in universo mundo. »

« Sankta Paŭlo Apostolo, predikanto de la Vero en la tuta mondo. » (*Liturgio*, en la festo de Sankta Paulo, 30-an de junio.)

1. La Direktoro de *Espero Katolika* publikigos kaj vendos, je siaj propraj elspezoj kaj riskoj, katolikajn librojn au broŝurojn en Esperanto. Li liveros ilin al la membroj de *Societo Sankta Paŭlo* kun diskonto da 20 p. cent. — Kompreneble, la restantaj libroj estos vendataj al nesocietanoj laŭ la prezo de l'katalogo.

2. Oni fariĝas Societano pagante almenaŭ 2 Sm. (5 fr., 4ŝ., 1 dolaro, ktp.), pro tiu sumo, ĉiu Societano ricevos *Valorpaperon* da 2,40 Sm. (6 fr.) per kiu li havos

rajton aĉeti librojn aŭ broŝurojn ĝis sumo da 2.40 Sm., laŭ laprezo de la katalogo. (Tio donas precize diskonton da 20 p. cent.)

3. Tuj kiam libro aŭ broŝuro aperos, ĝi estos sendata al ĉiu Societano, sen ke li bezonos skribi por mendo (escepte se li deziras du aŭ plurajn ekzemplerojn).

4. Ĉiu Societano povas aĉeti du, tri, kvar, k. c., *Valorpaperojn*, laŭvole. Li ricevos nombron da ekzempleroj korespondantan al la nombro de siaj V.-P.

5. Ĉiu Societano povas aĉeti kun la dirita diskonto la librojn eldonitajn antaŭ sia aliĝo al la Societo.

6. Estas membroj *Bonfarantoj* kotizaĵo da 500 fr., kun rajto ricevi senpage *Espero Katolika* kaj ĉiujn eldonaĵojn de la Societo dum 10 jaroj.

7. Estas membroj *Protektantoj* kotizaĵo da 100 fr., kun rajto ricevi senpage *Espero Katolika*, dum 10 jaroj, kaj aĉeti ĉiujn eldonaĵojn de la Societo kun diskonto da 33 p. cent. ĝis sumo da 50 fr. (laŭ prezo de la katalogo).

Mi pensas, ke per tiu tre simpla plano, la malfacilaĵoj estas evitataj : la Societo povas *tuj* funkciadi.

Bonvolu pripensi la aferon, por konigi vian opinion en Cambridge ; kaj eĉ se vi ne iros en Cambridge, vi povas sendi viajn ideojn al P-o Richardson, ĝenerala Sekretario de la Katolikaj Kunvenoj. Em. PELTIER.

II. — *Fondo de Esperantistaj Katolik-Oficejoj.*

La Ĝenerala Kunveno estas petata pridiskuti jenan demandaron :

1. Ĉu ni devas organizi *Esper. Katolik-Oficejojn*, kies celo estus : informi pri religiaj aferoj, diservoj, religiaj kuriozaĵoj vizitindaj, k. c. ?

2. Kiamaniere ilin organizi ?

3. Ĉu oni ne devas unue realigi proponon jam faritan de S-o Evstifeieff, pri la kreo de tri gravaj centroj, en Romo, Jerusalemo kaj Parizo ?

KUNVENO DE KATOLIKAJ PĀSTROJ

I. — *Projekto de Fratara de Katolik-Esperantistaj Pastroj.*

1. **Celo.** — Unuigi la katolikajn pastrojn diversnaciajn por faciligi inter ili per Esperanto rilatojn, pri pastraj sciencoj kaj ĉiuspecaj religiaj aferoj.

2. **Organo kaj kotizaĵo.** — La organo estas *Espero Katolika*, kaj la kotizaĵo estas la abono al *Espero Katolika*. — Sed estas tre dezirinde, ke la Societo havu *specialan Aldonon* al la gazeto por pritrakti specialajn demandojn kiuj ne interesus la ordinarajn legantojn de *Espero Katolika* (Ekz. analizo de la ĉefaj gazetoj katolikaj; notoj pri libroj teologiaj, filozofiaj, Bibliaj, ktp.).

Tiu *Aldono* povos ekzisti nur kiam la nombro de la societanoj estos sufiĉa por pagi la preson de ĝi. Tiam, kompreneble, oni devos iom pligrandigi la kotizaĵon.

3. **Adres-libro.** — Estas dezirinde ke ni havu *Adres-libron* de ĉiuj katolik-Esperantistaj Pastroj, por ke la katolikaj Esperantistoj, kiuj vojaĝas, povu sin turni al samideanaj pastroj, se ili bezonas religian helpon. La kunveno diskutos per kiuj rimedoj oni povas presigi tiun adres-libron.

4. **Agado.** — La membroj de la *Fratara* devos : *a)* klopodi por divastiĝi Esperanton inter siaj kunfratoj ; *b)* konigi la organon de la Societo (ili povos ĉiumonate peti la sendon de unu numero al amiko, senpage) ; *c)* kunlabori, se eble, al la *Societo Sankta Paŭlo*, per tradukoj aŭ originalaj verkoj.

5. **Organizacio.** — Projekto de Regularo estos proponata al la kunveno por diskutado. Jen skizo : komitato da 5 membroj administras la societeton : Prezidanto, Vic-Prezidanto, Sekretario-kasisto, kaj du Komitatanoj. — Ili estos elektitaj por tri jaroj (la unuan fojon, provizore por unu jaro, post kiu ili estos definitive elektitaj aŭ ne).

En ĉiu nacio, kiam estos eble, la societo havos *Kores-*

pondantojn, kies ofico estos informi pri la religia movado, sendi analizon de la ĉefaj artikoloj en katolikaj gazetoj, propagandi inter le pastroj.

Ni esperas ke tia Frataro tre utilos por la *Unuiĝo de Kristanaro*. Ĝis nun ne ŝajnas eble, nek konsilinde, ke la katolikaj pastro unuiĝu en sama Societo kun protestantaj, rusortodoksaj aŭ grekaj pastroj; sed se niaj fratoj fondus, en ĉiu kristana eklezio, Frataron similan al la nia, oni povus esperi fruktodonan rezultaton.

NOTO. — Tiuj, kiuj deziras fari proponon dum la kunveno, estas petataj informi P-on Richardson pri tio, *antaŭ* la kunveno, por ke li povu enskribi la demandon en la tagordo.

Em. PELTIER.

KUNVENO DE LA KATOLIKAJ KOMERCISTOJ KAJ INDUSTRIISTOJ

Projekto de Societo La Abeló Esperantista, Amika Unuiĝo de katolikaj Komercistoj kaj Industriistoj.

1. **Celo.** — Unuigi la katolikajn komercistojn kaj industriistojn el diversaj nacioj en Societo, por faciligi la komercajn internaciajn rilatojn.

2. **Organo kaj kotizaĵo.** — La organo de la Societo estas *Espero Katolika*, kaj la kotizaĵo estas la abono al *Espero Katolika*, kun plipago da 50 Sd (1 fr. 25) : 1 fr. por eldono de *Jarlibro*, publikigota jare de la Direktoro de *Espero Katolika*; 25 centimoj por la Sekretariaj elspezoj kaj dissendo de la jarlibro al la Societanoj.

3. **Profitoj.** — Ĉiu Societano *a)* havos rajton presigi *unu* senpagan anonceton en *Espero Katolika*; *b)* ĝuos rabaton da 40 p. cent por anonci en *Espero Katolika*; *c)* povos anonci en la *Jarlibro* laŭ sama tarifo; *d)* ricevos sen plia pago la *Jarlibron*.

4. **Nomo.** — La nomo de la Societo estas *La Abeló Esperantista*. La abelo estas simbolo de senlaca kaj fruktodona laboro.

(Provizora Regularo por unu jaro estos proponata al la diskutado de la interesatoj, en Cambridge.)

Nu, karaj fratoj, bone laboradu, dum la kongreso. Miaj bondeziroj iras tutkore al vi! Em. PELTIER.

LA ESTONTO DE L'KATOLIKISMO, EN FRANCUJO

« Estas antaŭ ĉio ĝustatempa kaj saviga konfidigi la animon de la junaj generacioj, de kiu dependas nia estonto. »

Tiu penso inspiris al Lia Prelata Moŝto Batiffol, Rektoro de la Katolika Toulous'a Instituto, la paĝojn, kiujn ni ĉi tie mallongigas. Ili alvenas al ni de translimando, aldonante al la forto, kiun donas al ili la scienco kaj alta ofico de ilia aŭtoro, la krediton alvenintan el la alilándaj amikoj. Ĝi estas parolado farita, en oktobro lasta, ĉe la popola Luxemburg'a Universitato, en la ĉeesto de Lia episkopa Moŝto Kopper.

« Kiam oni parolas pri la estonto de l'katolikismo, oni povas aserti ke la maloptimistoj ĉiam estas malpravaj. »

Lamennais, en 1834, skribis al sia juna amiko Emmanuel d'Alzon, la fondinto de l'Asumcionistoj. « La pastraro estas ankoraŭ io. — Sed ekster ĝi neniu prizorgas katolikismon aŭ Eklezion... Ili naskas nek malamon, nek amon. Oni rigardas ilin kiel mortintaj... Nur se ili reaperus sur la politika sceno, oni piedbate reĵetus ilin en ilian tombon. »

Lamennais eraris : tion ja pruvis la estonto ; oni sin okupas pri Eklezio en Francujo, eble kiel neniam oni sin okupis pri ĝi ; ĝi estas, ĝi vivas, pensas kaj moviĝas kaj ĝi prezentas, malgraŭ ĉiuj malfeliĉoj, provizojn, kiuj igas antaŭsenti konfide pri ĝia estonto, laŭ la triobla vidpunkto materiala, politika kaj religia. Ĝi estas la tuta tezo de Lia episkopa Moŝto Batiffol.

— **Estonto materiala.** — « La ĉefa demando, diris Bismarck, estas la stomaka demando. »

Ĝi priokupas, ne okupante ĝin absolute, la francan pastraron, pro la manko de ŝtata salajro, aŭ pro plimalgrandigitaj aŭ ne firmaj pensioj. La Prelato detale studas la rimedojn ilin havigi metioj konvenantaj al pastro; ekleziaj mutualecoj; parokaj kunhelpoj; organizado, laŭ la diocezoj (eparkioj) de l'religia denaro, kaj kiel helpaj rimedoj, rearanĝo de l'parokoj, kaj por la maljunaj pastroj, komuneca vivado.

Li konkludas ne kaŝante cetere la seniĝojn kaj ĝenon naskiĝontajn pasante de unu vivmaniero al la alia :

— Vi vidas ja, Sinjoroj, permesate estas konsideri kviete la budjetan demandon. Forta mutuala organizado garantios al niaj pastroj la trankviliĝon de iliaj maljunaj kaj malsanecaj tagoj. Komuneca vivado, organizado plejofte propramova kaj neniam eksklusiva, havigos al niaj pastroj, precipe al plej junaj, estadon ĉiamaniere pli eklezian, kaj samtempe materiale simpligitan. Ni forlasos tiun mensogan aferostaton, kiu ĝis nun ŝajnis kalkuli en ĉiu paroko tiom da parokanoj, kiom la oficialaj statistikoj kalkulis da loĝantoj : la senparokanaj parokoj ne bezonas pastron, ili nur bezonas misiiston; la parokoj, kiuj estas veraj parokoj, ĉiam havos pastron, se ne je fiksa posteno, almenaŭ por ĉiuj bezonoj kaj ĉiuj esencaj religiaj ekzercoj. La paroka kaj dioceza malavareco, organizita de niaj episkopoj, helpos tiun ministraĵon, tago post tago. Ni esperas ke la eklezia proprao reformiĝos sufiĉe rapide, inter la manoj de niaj episkopoj, kaj sub la garantio de ilia administrado.

— **Estonto politika.** — Pli grava estas la demando Kio okazos efektive por la Franca katolikismo, de la apartiĝo de Eklezio kaj Ŝtato, kiun plimulto da 1,400,000 voĉoj ŝajnis aprobi per la lastaj elektoj?

Lia Prelata Moŝto Batiffol malaperigas unue tiun antaŭjuĝon, laŭ kiu la tiel aprobita apartiĝo devis esti dezirata de niaj samlandanoj la radikalistoj, Combes

antaŭ la aliaj, tre timis « salton en la nekonaton » kaj aliĝis al la religia kontrakto pro la samaj kaŭzoj, kiuj suferigis nin ; ni ankaŭ, ni aliĝis al ĝi kiel al materiala trankviligo kaj al pacokontrakto. La rompo reale estas rapidigita de la socialistoj.

— En la lastaj tagoj de la 1904-a Aprilo, revenante de Romo, mi renkontis en vagonaro, inter Carcassonne kaj Castelnaudary S-on Jaurès. Ni havas komunajn liceo-kamaradojn, mi ekinterparolis, kaj, ne ĉirkaŭ frazante, petis lin pri la jeno « Kiam vi faros la apartigon? » Li tuj respondis : « Post kvin jaroj. » Post dek-ok monatoj, dank' al la kunhelpo de la socialistoj, de l'radikalistoj kaj de l'neantaŭvidito, la apartiĝo estis farata. Kaj, ĉar la lando nur juĝas la leĝojn kiām oni altrudas ilin, la lando siaflanke voĉdonis kaj aprobis.

Tiun perfortan almiliton de la socialistoj kaj radikalistoj ne povis kontraŭbatali la Franca katolikismo, tial ke, Sinjoroj, kvankam tute paradoksa ŝajnos al vi mia aserto, al vi, kiuj elkonas la politikan organizadon de l'germana kaj de l'belga katolikismo, mi kuraĝas diri ke la franca katolikismo ne estas praktike organizata, kaj kredeble neniam estos.

Permesu ke mi citu parolon de Pio X-a. Ricevita en privata audienco, ian tagon de la Aprila fino 1904-a, mi havis la honoron aŭdi la Sanktan Patron parolantan al mi pri Francujo, kaj dirantan « Mi ricevas ĉi tie konstante Francojn. Nu, tiu ĉi diras al mi Mi estas Bonapartista. Aliulo Mi estas respublikano ; kaj tiel plu. Kial ili ne nur estas katolikoj ? Vidu la Germanojn. Sed vi, Francoj, vi ne komprenas : *Voi traversez la testa plu dura deĵ Tedeschi !* »

— Sinjoroj, tiu plensaĝa parolo vidigas la nekapablecon naskitan de la historia edukado, kaj precipe de l'karaktero de la Francoj.

Kvar cent jaroj de konkordato (mi preskaŭ dirus de servuto) ne povis doni al ni la morojn de malplimulto, aŭ sciigi nin pri kontraŭmeto.

De tridek jaroj, kiam la povuloj direktas tian politikon, ni estus povintaj nin starigi, se ne kiel koncentriga, almenaŭ kiel konstitucia partio, same kiel la Germana Centro. Leono XIII-a persone provis formi tiun partion; li ĉagreniĝis ne sukcesante.

Kio do estis kaj kio de ĉiam estas tiel kontraŭstara al tiu unuiĝo?

Estas tio ĉi, Sinjoroj, nome ke por katolika Franco, la religio restas intima, persona kaj familia afero; la Eklezio estas por li la « loko de l'animoj ». Li elpensas la spiriton kaj mondon kiel kontraŭaĵon. La spirito, laŭ li, estas el privata ordo. Tio, kion li ne komprenas, sekve, estas politika Eklezio. La deŝtatiĝo estas do postulata de la nacia logiko. Kaj tio estas, en teologia rilato, tre kritikinda, mi konsentas kun vi pri tio; sed la Franco estas, almenaŭ de la franca revolucio, psikologie tiel farata.

Ne eraru tamen, kiel S-o Faguet, kiu verkis elokventan ja kaj observan libron en kiu li penadas montri, ke la kontraŭeco al pastraro estas spirita stato, tradicia kaj nacia ĉe ni, tiamaniere ke, kiam vi alvenos al la lasta paĝo de lia libro, vi demandos vin kiel okazas, ke Francujo produktis Paskal'on aŭ Bossuet'on, ke la religio senĉese floradis en Francujo, kaj daŭras ankoraŭ nun tiel bone. Efektive, Sinjoroj, Franco estas katolika por si, kaj se ne por si mem, li estas katolika por sia edzino, por siaj infanoj: li estas katoliko *individue* kaj *familie*, sed ne *politike*.

Jen kial katolikismo ne estas politika partio en Francujo.

Kontraŭe, Sinjoroj, la originaleco de l'franca katolikismo konsistas en tio, ke, en ĉiuj partioj, — ekster la Framasonoj — oni kalkulas katolikojn. Iu skribis: « La elektantoj de S-o de Mun iras meson, kaj ankaŭ tiuj de S-o Jaurès. » Nature, tiaj formuloj estas troaj, se oni universaligas ilin. Sed tre vere estas, ke en iaj Francaj regionoj, kie la katolikismo estas ankoraŭ tre forta, la

katolikismo enhavas, inter la elektantoj de la respublika plimulto, tre multajn bonulojn alirantajn meson, kaj plenumantajn siajn religiajn devojn. En suda diocezo, kiun mi konas iom, deputatoj kaj senatanoj estas, de 1889, eksklusive radikalistoj : statistiko farita en 1900 de la episkoparo permesas jesi ke inter 85,000 viroj en la aĝo komuniĝa, proksimume 60,000 siajn Paskajn devojn plenumas. Se vi demandus tiujn elektantojn kial ili tiel voĉdonas kontraŭ la utiloj de sia kredo, ili respondu per unu vorto, kiun mi aŭdis tre ofte « Kion vi volas? Ĝi estas la partio ». — Sub tia respondo, Sinjoroj, vi ekkaptas la disiĝon de l'spiritulo kaj politikulo, kiun mi tuj denuncis al vi ; sed vi konstatas precipe tiun fakton : la katolikoj estas disigitaj en ĉiuj partoj.

— Kion ni devas konkludi de tio? Unuflanke, neniu partio povas pretendi prizorgi la katolikismajn aferojn, kaj el tiu vidpunkto oni komprenas la profundan analogion, per kiu la franca katolikismo parenciĝas — ne al Germana aŭ Belga katolikismo, — sed al la Angla. — Aliflanke, en Francujo, la katolikismo, kiu estas animostato, estas pli profunda ol tiu supraĵa politika agitado, kaj formas *mason* ne determineblan, verè, sed realan, kaj kiu ankoraŭ pezas efike en la landa ekvilibro.

Laste, pro la etatoj, el tiu maso senforma, ho ve ! kaj iamaniere senorgana, — sed ne el la politikaj partioj — stariĝis la kontraŭbatalo, kiu malkvietigis la registaron. »

Montalembert forte plendis, en 1865, ke la katolikoj tutatentegaj pri la individuismo, malzorgis agon kaj kunligon. Lia Prelata Moŝto Batiffol same plendas, skribante : « Kiel preferinda estus, se tiu balanĉiĝanta maso estus disciplina kaj decida maso ! » Konvenas al episkoparo unuigita, kaj kiel eble plej forte unuigita, organizi la francan katolikismon, kaj havigi al ĝi tiun dekobligitan forton de l'unuiĝo pri la eksklusive religia demando. Tie vere estas la savo, kaj la plej bona espora garantiaĵo en la demando politika.

Estonto religia. — « Ni insistos malpli pri la speciale religiaj konfidaj kaŭzoj proksimuma konservado de la kamparaj parokoj ; ekflorado de la bonfaradaj aŭ lernejoj faritaĵoj dun la 25 lastaj jaroj ; junulaj grupigoj, kiel la Katolika Juneco, al kiu apartenas rajte honora loko ; socialaj faritaĵoj kaj agado, renovigita apostoleco ; ktp. ktp. Neniu miros, se la episkopoj insistas ame pri la katolika instruado, tia kia ĝi devas esti donata, de la katekismo, al spiritoj, ho ve ! tro kutimigitaj kontentiĝi de formalista religia elpenso, kaj kiujn aliflanke la unuagrada lernejo instruas pri la plej malbonaj dogmaroj de l'naturalismo, pozitivismo, transformismo.

Li fine tiel difinas per bonegaj vortoj la veran naturon de la nuna krizo

« Ni vidas do tutmalkonfuzo, ke la nuna batalo estas last-analize ideobatalo. La deŝtatiĝo nur estas epizodo de multe pli malnova batalo ol la konkordato, kaj en kiu la konkordato nur estis interpaco. Kio estis nomata protestantismo aŭ filozofio, estas hodiaŭ nomata *laikismo*, kaj estas tutsama. La graveco de la krizo, kiun ni trapaŝas, estas kaŭzata de la ŝiro de popolo, kiun la novaj reformantoj volus disigi el lia religia kredo, kaj laŭ ilia dirmaniero, liberigi de ĉiu dogmo kaj de ĉiu Eklezio.

« Se, en Francujo, la katolikismo ne estas pri la scienca kaj dogmara indeco, armita kaj forta kiel oni dezirus, ĝi tamen enhavas homojn, kun kiuj la nuntempa pensado, se nur ĝi estas sincera, devas kalkuli. Ĝi estas plue movigata de ideofluado, kaj skuata de sciigado kaj honestigado tre kapablaj respektigi siajn metodojn, konkludojn, sciencan honestecon kaj kredon. »

Tiuj kauzoj kaj aliaj ankoraŭ, kiujn Lia Prelata Moŝto Batiffol estus detale dirinta, se tion estus permesinta la tempo, tre permesas konfide konsideri la estonton.

Paul DESCHAMPS.

KAUKAZAJ LEGENDOJ

DE P. D. ORSKIJ

I. Konvalo. — Kiam Kristo estis elkondukita per la Fariseoj por lo mokado en la korton de Pilato, — sur Lia kapo estis metita krono el prunelo; sur liaj ŝultroj estis purpuraĵo; kaj en la mano, anstataŭ scepro, estis bastono.

La militistoj aliradis al Kristo; mokante, faris al Li salutojn, kaj preninte el Liaj manoj bastonon, batadis Lin sur kapo aŭ vizaĝo.

Parte pro la batoj, parte pro la pikiloj de prunela krono, sur Lia vizaĝo fluadis la sango; sed Li pacience suferadis kaj la dolorojn kaj la mokadojn.

Al Kristo alvenis unu virino, kiu per la mano kondukadis ian knabeton.

La knabeto, ekvidinte la turmentadojn de Kristo kaj la sangon sur Lia vizaĝo, forkuris el la manoj de la patrino kaj kun ploro ĵetis sin al la militistoj, kaj petegante ilin ĉesigi la turmentadojn de Kristo, li penadis forpreni el iliaj manoj la bastonon.

Kristo ekrigardis la knabeton, ekkaregis lian kapeton kaj ekploris. Liaj larmoj faladis sur ŝtonajn platojn de la korto; la platoj kreviĝis kaj el iliaj fendoj elkreskis belega arbava konvalo.

II. Grosujo. — Le diablo tre ĝojis, kiam apostolo Petro malkonfesis Kriston kaj li kalkulis, ke la animo de Petro enfalos al li en inferon, kiel l'animo de alia apostolo, — de Judo.

Petro baldaŭ ekpentis; li suferadis anime kaj multe ploris.

Unu fojon, en sonĝo venis al li Kristo kaj diris, ke Li pardonas lin pro lia sincera pento kaj multegaj larmoj.

Petro ne tuj ekkredis kaj petis:

— Sinjoro, se Ci pardonis mian grandan, teruran pekon, montru ĝin al mi per ia signo!

« — Jen estas cialarmoj, Simono-Petro! » diris Kristo, montrante per mano la ekkreskiĝintan subite grosujon kun beroj.

III. **Violo.** — Kiam oni kondukis Kriston por ekzekuto kaj devigis Lin porti la multepezan krucon, sur kiu Li poste estis krucumita, Li malfortiĝis sub pezo de la kruco kaj falis teren.

Unu Fariseo komencis devigi Kriston iradi, kaj per bastono ekbatis Lin sur vizaĝo.

El la vundo ekŝprucis sango.

Mario Magdaleno komencis kolekti de l'tero la sangon de Kristo; sed la militistoj kaj Fariseoj maldelikate ŝin forpuŝis kaj la lokon, kien falis la sango, ebenbatis per piedoj.

Kiam la militistoj forkondukis Kriston, Mario Magdaleno ne sekvis la amason; sed malproksime de tiu ĉi loko genufleksis kaj kun larmoj preĝadis « Sinjoro! Konservu al popolo Cia, por la memoro, la bonodoron de Cia sankta sango! »

Baldaŭ sur tiu-ĉi loko el la tero ekmontriĝis la folioj de la violo kaj poste ankaŭ ĝia floro.

IV. **Pasero.** — Kiam Kristo sur la kruco, klininte kapon, fermis l'okulojn kaj eklasis la spiron, sur la krucon alflugis pasero kaj laŭte komencis kriadi: « Li estas viva, viva, viva! », per ĝia krio klarigante, ke Jesu-Kristo ankoraŭ ne mortis. Unu militisto aliris al kruco kaj per ponardego trapikis la flankon de Kristo.

El rusa lingvo esperantigis.

D-ro A. M. GRUNFELD (*el Kiŝinevo.*)

LA KRISTIMITADO

Pertransiit benefaciendo.
(*Act. Ap., x, 38.*)

Kristo trairis bonefarante...
Se Vi ĝin kredas, kristano pia,

ŠVIESOS LAIŠKELIS

SAVAITINIS POLITIKOS LAIKRAŠTIS.

„ŠVIESOS LAIŠKELIO“ kaina su prisiuntimu Vilniuje ir kitur: metams—1 r., pusmečiui—50 k., 3 mėnesiams—25 k. Užsirašusiems „Šviesa“—„Šviesos Laiškelis“ siunčiamas veltui (dikai).

Laiškai ir pinigai laikraščio apmokėjimui siųsti reikia pagal šio adresą: Vilnius, Odinė (Koževenaja) gatvė, № 11 „ŠVIESOS“ ir „ŠVIESOS LAIŠKELIO“ Redakcija ir administracija.

Ko užsimanė!

Mūsų lenkomanai labai daug ko pradėjo pastarais laikais užsimanyti. Tai jie nori, kad visur ant visų iškabų Lietuvos miestuose būtų lenkiški parašai, tai nori, kad Vilniaus gatvių vardai būtų butinai lenkiškai parašyti, tai jie nori kad Lietuvos bažnyčiose visur viešpatautų lenkų kalba, o lietuviai, nors lenkai skerdynes jiems rengia daugi su dragunų pagelba, kad visgi vadintų juos savo broliais, labai daug ko užsimano mūsų lenkomanai. Vis dar jie nenori atsižadėti to malonaus jiems sapno, kad Lietuva tai Lenkijos provincija. Lenkomanų dienraštis „Kurjer Litevski“ štai vėl užsimanė ko, kad lietuviai valdiška savo kalba laikytų lenkišką. Jo № 292 straipsnyje „Lietuviškoji rusifikacija“ pirmos Lietuvių dailos parodos atidengimo aprašyme išmetinėjama nešvariausiu būdu mūsų gerbiamam tautiečiui d-rui J. Basanavičiui, kam jisai per atidengimą nepasakęs prakalbos lenkiškai, o tik rusiškai ir lietuviškai, kam jis atsakęs baltgudžių kalbėtojui rusiškai ne lenkiškai,

kaip jis, pagalios, drįsęs dailininkus lietuvius iš gimimo, kaip garsųjį Pijų Velioniškį (Velonskį) pavadinti lietuviu ir priskaityti jį prie lietuvių dailininkų (daidalių) „Girdėdami tą visą, sako „K. L.“ žvalgėmes, ar nėra tik kur lentelės su parašu: „lenkiškai kalbėti uždrausta“... Veltui, ponai lenkomanai, mums tą prikaišiojate jūs tai tikrai malonėtumete, kad visur būtų mūsų „pagoniškoji“, kaip mėgstatė sakyti, kalba būtų uždrausta ir panaikinta, kaip Vilniaus bažnyčiose, todėl ir norite savo lenkiškąją kalbą užmesti mums, kaipo valdiškąją. Bet ką gi darysi, nors ir daug ko užsimanote, bet niekas iš tų jūsų užsimanymų neįvyks, nes... ne jūsų tai valioje ant mūsų laimės...

Taigi veltui klejojate...

O kad jus žadate „susilaikyti gal ir ilgą laiką“ nuo pratešimo mums savo rankos, kaip mums grąsinate savo „Kurjere“, tai, meldžiamieji, susilaikykite nuo to nors ir ant visados. Męs tik to ir trokštame. Tamstų nė rankos, nė kojos mums visai nereikalingos—tikėkite. Męs malonėtumėme, kad jus ne tik savo rankas atitrauktumėte nuo mus kuotoliausiai, bet ir patįs visai kuogreičiausiai išsinešdintumėte iš mūsų krašto. Kelias atvyras į Varšavą ar Krokavą—kur tinkama! Tik drožkite, meldžiamieji, skvernus pakėlę greičiaus, neprašyti....

Svarbiausieji atsitikimai.

— Persijos šachas, dovanojęs tikrąją savo, kraštui konstituciją su pilna ministerių atsakomybe prieš parlamentą, mirė. Persijoje yra du parlamento rūmų, nelyginant kaip mūsų Dūma ir Taryba. Žemesnysis parlamen-

to rumas negali buti paleistas be dviejų metų, o aukštesnisai gali buti paleistas jeigu du kartu atmestų žemesniojo rumo įneštus įstatymų sumanymus.

— Užmuštas liko Petrąpilyje revolverio šuviais viriausias karo teismo prakuroras Pavlovas.

Žinių-žinelės.

Vilnius. Gruodžio 27 d. vidudieny atidengta liko pirmoji lietuvių dailos paroda. Toji paroda tilpsta pirmamajame gyvenime p. Petro Vileišio namuose № 24 a, Antakalnio gatvė. Parodą atidengė Dr. J. Basanavičius, kurs kalbėjo rusiškai ir lietuviškai, nurodydamas tos šventės svarbumą ir tą, kad mūsų daila, nors ir išrodo nauja, jauna, bet jau gyvavo Lietuvoje nuo labai senų laikų, tuomet dar kada jie buvo ne ant tų vietų, kur dabar ir kad lenkų dailai pradžia davęs lietuvis teplotojas Jokubas, pramintas lenkiškai „Vežyku“. Kalbėjo teipipat labai graudingai ir draugiškai atstovas baltgudžių laikraščio „Nasza Niwa“ p. A. Byčkouski, sveikindamas lietuvius su tuo dideliu kultūros laimėjimu, kokiu yra toji atidengta paroda. Sakė jisai, kaip jiems sunku yra kilti iš amžino miego, kaip dar Baltgudija vergišku sapnu sapnuoja, kaip ją lenkino ir tebelenkina dvasiškija „dangumi viliodama, pragaru baugindama“, kad tik baltgudžiai išsižadėtų savo kalbos ir tautystės, o liktų lenkais. Bet baltgudžiai, anot kalbėtojo, atsižiūrėdami į lietuvius žengs drąsiai pirmyn, kelsis iš tautiškojo miego, nevirs į lenkus, nes viltį jiems duodąs lietuvių atgijimas, nes jie tikisi sulauksią nuo

lietuvių paramos ir pagelbos. Dr. J. Basanavičius atsakęs jam rusiškai, kadangi baltgudiškai nemokėjęs, jog lietuviai atjaučia visą baltgudžių vargo naštos sunkumą ir nori būti su jais kuoarčiausiuose santikiuose. Kalbėjo dar atstovas nuo rusų laikraščio „Svobodnoje Slovo“. Paskui visi buvusieji buvo pakviesti įrašyti savo vardus atminimo dėlei į atminties knygą,

Paroda išrodo labai puikiai. Kaip ant tokio trumpo laiko, kuriame rengta buvo paroda, reikia stačiai stebėtis, kaip tiek ir tokių gražių darbų liko surinkta.

Įpač puikus paveikslai p. Čurliano, nors dėlei savo aukšto simboliškumo nevisai tėra suprantami. Teipat labai gražus ir gali būti gražiausios Europos parodos papuošimų veikalai mūsų tautiečių—p. Stabrausko, Žmuidzjnavičiaus, Leščinskio, Kalpoko, smulkesni bet labai gražus darbai p. Jaroševičiaus ir kitų. Skaptorystės darbų neperdaug, beveik visi gabaus mūsų skaptoriaus p. Rimšos. Labai žingeidus skaptoriški darbai jauno P. Virbickio, paprasto sodžiaus vaikino. Labai gražus skyrius žmonių rankų darbų, juostų, marginių, išsiuvintų ir visų kitų išdirbinių iš medžio: saukštai, lazdos, rėmeliai ir t. t.

Žodžiu, paroda daro kuomaloniusi įspūdį ir duoda mums viltį greitu laiku susilaukti matyti mūsų dailę ant atsakančios jai papėdės. Įėjimo biletai kaštuoja 20 kap., mokiniams—10 k. Paroda bus atidaryta netrumpiau mėnesio. Verta joje apsilankyti kiekvienam lietuviui.

Rapidu fari bonon konstante,
Imitu Kriston dum vivo via !

Faru vi bonon al ĉiu homo,
Helpadu ĉiun, ne demandante
Pri lia kredo, pri lia nomo,
Iru kun Kristo bonefarante !...

Prof. A. DOMBROVSKI.

LA VORTO

In principio erat Verbum.
(JOAN., I, I.)

La Divort' estis en la komenco
Kun senfina saĝec' kaj potenco,
Kaj la mondo laŭ Vorto ordona
Ekfariĝis kaj estis tre bona...

Homa vort', vi imitu Divorton',
Lian agon, saĝecon kaj forton !
Forigadu ĥaosan la denson,
Kreu lumon, kaj vivon kaj penson !

Prof. A. DOMBROVSKI.

(El la bela *Versajareto*, de P-o Dombrovski.)

KOMENTARIO PRI LA PREĜARO

Patro Nia. — Kelkaj personoj eble miros ke ni kuraĝis ŝanĝi la tradukon de l'*Patro Nia*, presita en la *Preĝareto* de S-o L. de Beaufront kaj liverita de D-ro Zamenhof mem. Jen kial mi permesis al mi fari tian ŝanĝon.

Kiam mi vizitis nian Majstron por la unua fojo, antaŭ la malfermo de la Kongreso de Boulogne, mi parolis kun li pri la traduko de *Patro Nia*, kaj demandis lin laŭ kiu teksto la traduko estis farita. D-ro Zamenhof respondis ke la tradukon li faris *laŭ la Rusa teksto*, kaj li lasis al

mi plenan liberecon por ŝanĝi la tradukon, por ke ĝi estu pli konforma al la katolikaj tekstoj originalaj. Mi do, kun la lerta helpo de kelkaj tre kompetentaj Esperantistoj, elektis la sekvantan tekston :

Patro Nia, kiu estas en la ĉieloj, sanktiĝu via nomo ; alvenu regno via ; fariĝu volo via, kiel en la ĉielo, tiel ankaŭ sur la tero. Panon nian ĉiutagan donu al ni hodiaŭ, kaj pardonu al ni ofendojn niajn, kiel ni ankaŭ pardonas al niaj ofendintoj, kaj ne konduku nin en tenton, sed liberigu nin de l'malbono. Amen.

Saluton, Mario. — Mi ŝanĝis nur la unuan parton de la *Anĝela Saluto*, por ke la teksto estu pri proksima al la latina originalo :

Saluton, Mario, graco-plena ; la Sinjoro estas kun vi : vi estas benata inter la virinoj, kaj benata estas la frukto de via karno, Jesuo.

Sankta Mario, Dipatrino, preĝu por ni pekuloj, nun kaj en la horo de nia morto. Amen.

IMITADO DE JESU-KRISTO

Specimeno de la traduko, kiu estos baldau preta por preso, kaj aperos post la libertempo.

UNUA LIBRO

Utilaj konsiloj pri la vivo spirita.

UNUA ĈAPITRO

Pri l'imitado de Kristo kaj malŝato de ĉiuj vanaĵoj mondaj.

1. « Kiu sekvas min ne marŝas en mallumo. » Jen estas paroloj de Kristo, per kiuj Li admonas nin ke ni

imitu Lian vivon kaj Lian konduton, se ni volas esti vere lumigataj kaj de ĉiu blindeco je l'koro liberigataj.

Nia do precipega zorgo estu mediti pri la vivo de Jesu-Kristo.

2. La Krista doktrino superas ĉiujn doktrinojn de sanktuloj; kiu spiriton ĝian posedus, tiu manaon tie kaŝitan eltrovus. Sed okazas ke multaj homoj, oftege l'Evangelion aŭdantaj, nur malmulte kortuŝiĝas, tial ke Kristan spiriton ili ne havas. Kiu volas la parolojn de Kristo plene kaj ĝuste kompreni, tiu devas konformigi sian tutan vivon al Lia.

3. Kiele utilos al vi profunde diskutadi pri Triunuo, se vi malposedos humilecon, kaj per tio malplaĉos mem al la Triunuo?

Belegaj paroladoj ja ne faras homon sankta kaj justa; sed pura vivo igas lin kara al Dio.

Mi pli amas senti penton ol koni ĝian difinon.

Se vi memore sciis tutan Biblion, kaj samtempe sentencojn de ĉiuj filozofoj, por kio utilis al vi ĉio tio sen amo al Dio kaj helpo de Li?

4. Vaneco de vanecoj, kaj ĉio vaneco, krom ami Dion kaj Lin solan servi!

Superega saĝo estas celi la ĉielan gloron per malestimo *de l'mondo*.

Vantaĵo estas do kolekti pereeman riĉon kaj en ĝi esperi.

Vantaĵo ankaŭ, ambicii honorojn, kaj sin altigi al estimegata stato.

Vantaĵo, karnajn plezurojn sekvi kaj avidi tion pri kio baldaŭ venos severega puno.

Vantaĵo, longan vivon deziri, kaj malforte zorgi pri bona vivo.

Vantaĵo, nunan vivon nur atenti, kaj la aferojn estontajn ne antaŭvidi.

Vantaĵo, tion amegi, kio rapidege pasas, kaj ne rapidi tien, kie restadas eterna feliĉo.

5. Tiun proverbon ofte rememoriĝu: Okulo ne satiĝas pri vivado, orelo ne pleniĝas pri aŭdado.

Elprenu do zorge vian koron el amo al videblaj aferoj, kaj ĝin al la nevideblaj turnu. Ĉar la homoj, kiuj serĉas sian sentamon, malpurigas sian konsciencon kaj perdas la gracon de Dio.

DUA ĈAPITRO

Humile pensu ni pri ni mem.

1. Ĉiu homo nature deziras scii, sed kion valoras scienco sen timo al Dio?

Pli bona estas certe humila kamparano, kiu servas Dion, ol malhumila filozofa kiu, ne zorgante pri si mem, astran kuradon konsideras.

Kiu bone sin konas, sin malestimas kaj malŝatas la homajn laŭdojn.

Kiam universalan sciencon mi tute posedus, en kio, se mi ne havus kariton, tio ĉi utilis al mi antaŭ Dio, kiu min juĝos laŭ la faroj?

2. Moderiĝu pri tro fervora deziro al scienco, ĉar tie vi trovos nur grandan distrecon kaj iluzion.

Scienculoj tre ŝatas ŝajni instruituloj kaj esti tiel nomataj.

Estas multaj objektoj kiuj malmulte aŭ neniel utilas al animo; kaj tiu estas malsaĝega, kiu sin okupas pri ceteraj aferoj, kiuj lian saviĝon ne interesas.

Multaj vortoj ne satigas animon, sed bona vivo koron trankviligas, kaj pura konscienco donas grandan konfidon al Dio.

3. Ju pli multe kaj bone vi scias, des pli severe vi estos juĝata, se vi ne estos pli sankte vivinta.

Ne volu do fieriĝi pro arto aŭ scienco ajn, sed prefere timu pro kono al vi donita.

Se vi kredas ke vi scias multon kaj bone, memoru tamen ke plimulton vi nescias.

Vin ne plialtigu mem, sed plivole konfesu vian nesciencan.

Kial vi volas pliami vin ol ceterajn, kiam aperas tiom da homoj pli kleraj ol vi kaj pli lertaj pri dia leĝo?

Ĉu vi volas ion utile scii kaj lerni? Amu esti nekonata kaj kvazaŭ nenio ŝatata.

4. La plej alta kaj plej utila scienco konsistas el la ĝusta kono kune kun malestimo de si mem.

Pro nenio grandiĝi kaj pri aliaj homoj ĉiam favore kaj alte opinii estas granda saĝo kaj perfekto.

Se vi vidus fraton malkaŝe kaj eĉ gravege pekantan, ne kredu tamen ke vi estas pli bona ol li, ĉar vi nescias kiom da tempo vi povos en bono persisti.

Ni ĉiuj estas kadukaj; sed kredu vin pli kaduka ol iu ajn.

HIMNO PASKA

(*Ad regias Agni dapes.*)

Specimo de la traduko de Himnoj por la 2-a kaj 3-a kajero de la *Preĝaro*.

En la festen' de l'Ŝafido,
Kun vestaĵoj blankaj, festaj,
Ruĝa tra Maro pasintaj,
Kantu ni al Krist' Diido;

Kies amego senlima
Korpon eloferas propran
Same kaj sangon plej puran,
Vera Pastro sindoneĵa.

Sangon verŝitan evitas
L'Ekstermanto sur la pordoj;
Staras l'Hebreoj trans l'ondoj,
Dum l'Egiptoj dronemortas.

Pasko Jesuo nun estas
Kaj ofero Paska nia;
Pia, por koro, nenia
Plia fort' kaj san' ekzistaŝ.

Vere ĉiela ofero,
La mort-reĝon vi detronis,

Al ni la vivon vi donis,
O vi l'Estro de l'infero.

Kristo, l'inferon venkinte,
La trofeojn montretenas,
Post si demonon li trenas,
La ĉielon malfermințe.

Por ke vi ĉiam ĝojigu
Nin, Jesuo, nia Pasko,
Nia spirita post nasko,
Nin de l'peko liberigu.

Estu la Patro glorplena
Kaj la revivinta Filo
Kun la Spirita konsolo
Dum la miljaro eterna.

Tradukis GHISLENO C.

LA JUNA KNABINO SURPRIZITA DE LA MARO

Ne estas en aŭtuno, pli belaj tagoj ol tiu ĉi. La maro briletis per la suno; ĉiu guto da akvo rebrilis, kiel diamanta pinto, blankan kaj puran lumon, kiun okulo apenaŭ toleris. El la forlasita vilaĝo, homoj virinoj, infanoj, alvenis amase sur la sablajn montetojn, kie miksitaj al timiano, la sovaĝa dianto kun violkoloraj floroj, elspiris sian kariofilan bonodoron.

Provizitaj per korboj, maldikaj retoj, ŝoviloj kaj longaj bastonoj kun feraj hokoj, ili atendis ke la tajdo malkovru la vastan marbordon kaj ĝiajn ŝtonegojn por kolekti la riĉan akiron preparitan de la Providenco, l'arĝentan lanson (fiŝon) kiu glitas tra la malseka sablo, la englutemajn krabojn, kaj la omarojn kun larĝaj pinĉiloj kaj la markankreton, la motoperlan mulon kaj la ĉiuspecajn konkojn.

Preskaŭ vespere, je la horo, kiam la fluo rapidas, kiel riverego ŝvelita de la pluvoj, la ĝoja amaso reiris al la vilaĝo.

Sed ĉiuj ne tie revenis.

Pensante pri koraj songoj, juna knabino forgesis sin sur malproksima ŝtonego.

Kiam ŝi elreviĝis, la ondo jam premis la ŝtonegon per ĝiaj akvoturniĝoj, kaj supreniris, ĉiam alsupreniris. Neniu sur la marbordo, nenia ebla helpo.

Kio fariĝis tiam en l'animo de la virgulino? Tion neniu scias, estas sekreto inter ŝi kaj Dio.

La morgaŭan tagon, oni retrovis ŝian korpon. Ŝi estis alliginta siajn longajn nigrajn harojn al algoj pendantaj, sendube por ne esti forportata de la ondegoj, por kuŝi en la benita tero, apud siaj gepatroj.

Ligna kruco montras la lokon kie ŝi dormas en la tombejo. Ofte, unu el tiuj, kiuj estis ŝiaj amikinoj, surgenuita sur la herbetaĵo, preĝas por ŝi, kaj kortuŝita de malĝojaj memoroj, deiras kun mallevita frunto, viŝante siajn larmojn.

(EL LAMENNAIS.)

Tradukis ELEDA.

LA HOMA VIVO

Al vojeto finiĝanta per terura profundegaĵo, la homa vivo estas simila. Oni avertas nin, pri tio tuj kiam ni ekmarŝas; sed la leĝo estas proklamita, tial ke ni devas ĉiam antaŭeniri. Mi volus returnen iri: Marŝu! marŝu! Nevenkebla pezo, forto, kiun nenia povas kontraŭbatali, nin fortiras; senĉese ni devas antaŭeniri al la profundegaĵo. Multe da malfacilaĵoj, da ĉagrenoj, lacigas kaj maltrankviligas nin dum la marŝado. Almenaŭ se mi povus eviti tiun teruran abismon! Ne, ne; mi devas marŝi, mi devas kuri: tiel estas la rapideco de l'jaroj. Tamen oni sin konsolas, ĉar iafoje oni renkontas amuzantajn objektojn, fluantajn akvojn, unutagajn florojn. Oni volus halti: Marŝu! marŝu! Kaj tamen oni vidas fali malantaŭ si, ĉion, kion oni renkontis: terurega bruego! neevitebla pereco!

oni sin konsolas ĉar oni kunportas kelkajn florojn pasante ŝiritajn, kiuj velkas en la manoj, de mateno ĝis vespero, kaj kelkajn fruktojn, kiujn oni perdas gustumante ilin : ensorĉo ! iluzio ! Ĉiam fortirata, ci alproksimiĝas la terurran profundegaĵon : jam ĉio ekmalaperas, estas la ĝardenoj malpli floraj, malpli belaj la floroj, iliaj koloroj malpli brilaj, la herbaroj malpli belvidiĝaj, la akvoj malpli klaraj : ĉio paliĝas, ĉio svenas. La ombro de l'morto montriĝas ; oni eksentas l'alproksimecon de l'abismo fatala. Sed iri ĝis la bordo estas necese. Ankoraŭ paŝon : jam la teruro konfuzas la sentojn, la kapo turniĝas, la okuloj eraras. Oni devas marŝi ; oni volus malantaŭeniri ; neeble : ĉio estas falinta, ĉio estas sveninta, ĉio estas foririnta.

(Fragmento el la *Predikoj* de BOSSUET.)

Tradukis VINKO.

PAĜO DE L'DIREKTORO

Avizo : Multaj amikoj skribas al ni, petante respondon kaj *ne metante poŝtmarkon por respondo*. Ili forgesas ke la granda nombro da leteroj ricevitaj kaŭzas al ni elspezojn, kiujn ni ne povas toleri pli longe. *De nun ni respondos nur al tiuj, kiuj sendos poŝtkarton kun pagata respond-karto* (aŭ en Franclando poŝtmarkon por la respondo). Al ceteraj ni respondos en la gazeto, kiam estos eble.

Kompreneble, tiu *Avizo* ne koncernas tiuj kiuj skribas al ni por kunlaborado aŭ por helpi al la propagando.

Neŭtraleco de Esperanto. — En nia lasta *Propaganda Kroniko* ni parolis pri la bedaŭrinda *Kongreso Jeanne d'Arc*, ĉe kiu oni publike diris, ke Esperantismo « estas entrepreno framasona ». Depost tiu artikoleto aperis en l'*Espérantiste* (Julia) grava *Letero malfermita* al Monsinjoro Foucault. En tiu letero la neŭtraleco de Esperanta estas plene certigata.

Oni scias (vidu *Espero Katolika*, Junia, p. 277) ke ni skribis al M-ro Foucault. Ni ricevis respondon tro malfrue por presigi ĝin en la lasta numero de *Espero Katolika*. — El tiu respondo, tre afabla, ni eltiras la sekvan-tajn liniojn :

Mi tute konfesas, ke la lingvo Esperanto estas nur ilo, kiu povas utili same por Vero kaj malvero. Per tiuj vortoj, Monsinjoro Foucault plene proklamas la neŭtra-lecon de Esperanto. Estas dezirindè, ke tiuj vortoj estu plejeble diskonigitaj, por malaperigi la malfavoran im-preson de la supre citita frazo, elparolita ĉe la Kongreso Jeanne d'Arc.

Evolucio de Religiã Ideo. — Pro malbona sanstato, mi ne povis verki la promesitan artikolon. Pri ĝi mi re-parolos en *Espero Katolika* oktobra. Nur prokrasto.

La Preĝaro. — Fine, la *Katolika Preĝaro* estos preta por la Kongreso. Ni esperas, ke ĝi kontentigos la katoli-kajn Esperantistojn, kvankam ĝi certe ne estos perfekta. Ni estos tre danka al tiuj, kiuj bonvolos montri al ni la neperfektaĵojn. Ni rememorigas la Subskribintojn, kiuj ĝis nune ne sendis la prezon de subskribo, ke ili rapidu sendi ĝin ¹. La ne-subskribintoj povas de nun sendi siajn mendojn. La *Preĝaro* estos liverita laŭ la vico de la mendoj.

Moderna Biblioteko ; Societo S-a Paulo. — Ni altiras la atenton de niaj legantoj al la venontaj eldonaĵoj de *Moderna Biblioteko* kaj de nia *Societo por katolika Vero*. Nia celo estas liveri al la Esperantistoj librojn utilajn, bele presitajn, kaj malkarajn. (Vidu la *Pro-jekton* klarigitan komence de tiu numero.)

Nekrologio. — Ni petas viajn preĝojn por la ripozo de l'animo de Eloi-Joseph WEMAES, mortinta la 19-an de junio 1907. S-o Wemaes estis 73-jara. Li lernis Esperan-ton en sia 70-a jaro. Li ofte kunlaboris al *Espero Katolika* kaj skribis mirinde Esperanton. Ni sendas al lia familio niajn plej sincerajn kondolencojn.

¹ Vidu prezon por ne-subskribintoj sur la kovrilo de la revuo

BONE MEMORU ke *Espero Katolika* ne aperas en aŭgusto, nek en septembro. La proksima numero aperos komence de oktobro (komenco de la 5-a jaro).

PROPAGANDA KRONIKO

INTER KATOLIKOJ

Catholic Home Journal, presita en St-Louis (Kanado), 16-paĝa, grand-formata, katolika gazeto, publikigis en sia junia numero plenan tradukon anglan de *Religia Persekutado en Franclando*, artikolo de nia Direktoro (*Espero Katolika* februara, verko de Monsinjoro Fulbert-Petit, episkopo de Besançon). Bedaŭrinde, ni ne povas danki la tradukinton, nek la sendinton de la ĵurnalo, tial ke ne estas surskribo post la traduko.

El Testigo, protestanta gazeto, eldonita en Guadalajara (Mexico) publikigis tradukon de la *Prediko* de nia Direktoro ĉe la 2-a Kongreso. Nian plej sinceran dankon al S-o A.-C. Wright, la tradukinto, de kiu estas redaktata la *Departemento de Esperanto* en tiu revuo. Proponata al la katolikaj gazetoj por imito...

La Verdad (el Murcia, Hispanl.) analizas nian majan numeron kaj afable anoncas la publikigon de *Hebrea Kalendaro*.

Rivista del Sacerdote Apostolico (Direktoro : Monsinjoro Roberto Soldini, en Macerata, Ital.) dediĉis tutan paĝon al *Espero Katolika*. Ni plej varme rekomendas tiun gazeton, bonege redaktitan al niaj amikoj Italaj.

Cosmos (5, rue Bayard, Paris), scienca katolika gazeto 32-paĝa, afable publikigis bibliografian noton pri la du gravaj verkoj matematikaj de P-o Dombrovski. Ĝi bedaŭras, ke la aŭtoro ne publikigis samtempe francan eldonon, por la sciencistoj. Sed estas tiel facile por sciencistoj lerni Esperanton, ke franca eldono ŝajnas tute senutila !...

Antaŭen Esperantistoj, la bonega kaj kuraĝa pioniro de Esperanto en Peruo, ankaŭ donis Hispanan tradukon, kune kun la teksto Esperanta, de la *Prediko* de P-o Pel-tier. Tre kurioza kaj instruiga estas kompari la tradukon de S-o Wright kun tiu de *Antaŭen Esperantistoj* ili estas mirinde similaj. Tio pruvas la superan klarecon de Esperanto.

L. MILHO.

UNIVERSALA KOMUNIKILO

Nova Delegato. — P-o A. Dombrovski, nun Direktoro de du gazetoj, en Kovno (Rusujo), estas de nun nia Delegato por *Litovujo* (provinco de Rusujo). Ni petas niajn amikojn de Litovujo, ke ili sin turnu al P-o Dombrovski por la abonoj al *Espero Katolika*.

Patro Nia, muziko de S-o Gothardo, el Wien, estas de nun aĉetebla (1 fr. 50) ĉe *Espero Katolika*. Tiu, belega, vere arta, kvarvoĉa kanto estos kantata dum la meso por Esperantistoj en Cambridge.

ABONMONOJ RICEVITAJ

Pro manko de tempo, ni ne povas liveri la plenan liston de la pagintoj, kiuj ricevos de la Direktoro vizitkarton, kiel ateston de pago. — Tiuj, kiuj ne pagis ĝisnune sian abonon, ricevos poŝtan-kvitancon, antaŭ oktobro. Ili estas petataj favore ĝin akcepti.

BIBLIOGRAFIA KRONIKO

Ce Moller kaj Borel (Berlino) estas aĉeteblaj : *Elektitaj Fabloj de Fratoj Grimm*. Tiu nova traduko de l'fama D-ro Kabe certe havos saman sukceson kiel *La Fundo de*

la mizero, kaj aliaj verkoj de l'sama aŭtoro. *Solveo de la problemo de lingvo internacia*, estas la represo de artikolo publikiginta en *Krestomatio*. Prof. Christaller verkis germanan tradukon, kiu estas presita flanke de l'Esperanta teksto. Kiel domaĝe, ke oni tute forgesis tiun gravegan artikolon, kiam oni proklamis la faman *Deklaracion* en Boulogne! Oni eble ne akceptos ĉiujn jesigojn de tiu verketo, sed oni devas memori la paĝojn 112-114.

Ce Librejo Hachette. — La verko publikigita ĉe *Moller kaj Borel* (Berlino) estas eldonita kun franca traduko de L. de Beaufront kaj D-ro Vallienne, kun titolo *Essence et Avenir de l'idée d'une langue internationale* (ekstrakto de *Fundamenta Krestomatio*). Aperis ankaŭ aparta eldono de *La Predikanto*, libro el la Biblio (*Ecclesiastes*), kiun oni legis en *La Revuo*, tradukita de D-ro Zamenhof el la originala (hebrea) teksto. Studinda pro la stilo modela. — S-ro Carlo Bourlet faris paroladon antaŭ la oficiroj de la Supera Mara Lernejo. La broŝuro, kiu enhavas tiun lertan paroladon estas tre interesa kaj liveras bonegajn argumentojn por propagando.

Vocabulaire technique et technologique français-espéranto, de S-o Ch. Verax (aŭtoro de *Elementa fotografa Optiko* kaj de *Vocabulaire français-espéranto technologique des termes photographiques*) estas tre atentinda verko 130 paĝa, bele kartonumita, en granda formato. La multaj kaj tre zorge elektitaj radikvortoj sciencaj de tiu *Vocabulaire* tre utilos al la Esperantistaj verkistoj kaj tradukistoj.

NOTO. — En nia lasta *Bibliografia Kroniko*, ni erare anoncis ke *Esperanta Sintakso* de P. Fruictier estis aĉetebla samtempe ĉe Presa Societo kaj ĉe firmo Hachette. Tiu lasta aĉetis de Presa Societo la tutan duan eldonon de la libro, kiu nun estas aĉetebla nur ĉe firmo Hachette.

Ce Presa Esperantista Societo. — Tiu bonega firmo, nun tute reorganizata, eldonas multon da interesaj verkoj.

Ni nur citas diversajn reeldonojn de literaturaĵoj aperintaj ĉu en L. I., ĉu en *Juna Esperantisto*, ĉu en *Int. Scienca Rev.* *Du Biletoj* (32 p.), komedieto de Florian, esper. de H. J. Bulthuis kaj L. Touchebeuf; *La Benkoj de la Promenejo* (8 p.), monologo de Coquelin, trad. de P. Corret; *La Kalendaro* (32 p.), originale verkita de Lengyel Pal; *Pri la Homa radiado* (16 p.), verkita en Esp., de S-ro Boirac; *Sinjoro Vento kaj Sinjorino Pluvo* (125 p.), de P. de Musset, esperantigita de Paul Champion. Plie aperis *Esperanta Radikaro* (88 p.), kun novaj radikoj private rekomenditaj de D-ro Zamenhof, kaj kun Franca traduko. Tre oportuna por meti en sian poŝon dum promenadoj. Kun *Clef-Répertoire*, franca, 1 fr.

Sed la plej grava eldonaĵo de tiu firmo estas la *Granda-Vortaro* (nune ĝis la vorto *Arcade*), kiu aperas tre regule, verkita de plej kompetentaj Esperantistoj. *Memoru bone*, ke la prezo estas preskaŭ *duobla* por tiuj, kiuj ne subskribos antaŭ oktobro proksima.

Libreto pri transmorta vivo (G.-T. Fechner, trad. el germane P. Kadik) estas tre kurioza verketo, bela konstruaĵo de bela imago; sed ni ne povas rekomandi ĝin al katolikoj, ĉar ĝi kontraŭdiras la katolikan doktrinon. — S-o Vs Lojko tradukis drameton de Puŝkin, kies titolo estas: *Mocart kaj Saljeri* (14 paĝ.). Leŭtenanto Bayol, daŭrigante sian laŭdindan agadon, liveras al ni la *Guide Esperanto de la Croix-Rouge*, frazareto kun franca traduko kaj montro de la elparolado. — *L'Esperanto, ses raisons d'être, sa structure, ses services, sa diffusion*, estas la nova broŝuro propaganda, kiun verkis la senlaca Prezidanto de la S. F. P. E., S-o de Beaufront. Bonega propagandilo. Ni plezure legis la *Rapport sur l'Esperanto*, kiun S-o Cart verkis por la Ministro de l'Publika Instruado Franca. Tre bele kaj rimarkinde presita en granda formato, ĝi estas vendata por la profito de la propagando de Esp. inter blinduloj. — La *Presa Societo* aperigis duan eldonon de *l'Esperanta Frazlibro*

de l'Turisto, kaj de *Une heure d'Esperanto*, la tre konata komedieto franca de S-o Cart.

Ce firmo A. J. Witteryck (Bruĝo, Belg.). — Tiu grava Eldonisto Belga liveris al la Esperantistaro tre ŝatindajn verkojn. Ni citos unue la bele ilustritan libron *Tra Mez-Afriko* (france kaj Esperante, de Komandanto Lemaire, la pioniro de Esperanto en Belgujo). Ĝi estas la intereseĝa Parolado, farita kun projekcioj, de K^{to} Lemaire ĉe la ferma kunsido de la 2-a Kongreso. Ankaŭ tre leginda estas *Blinda Rozo*, de H. Conscience, esperantigita de S-ino Edm. Van Melckebeke-Van Hove (belela eldonaĵo ilustrita, 52 p.). Mi kuraĝas diri, ke tiu kortuŝanta rakonto, bele presita kaj kovrita, estas unu el niaj plej ŝatindaj libretoj Esperantaj.

Sub la titolo *Kelkaj Floroj Esperantaj*, la sama firmo eldonis serion de libretoj bele ilustritaj, en kiuj troviĝas mallongaj rakontoj plej ofte humorajaj. Tre taŭgaj kiel legolibroj por la kursoj pri Esperanto. Ekzistas nune 3 diversaj numeroj 24 paĝaj. — *Companion of the English Esperantist* estas praktika lernolibreto, verkita de S-o A.-J. Witteryck mem, en Angla lingvo.

Pacifismo. — Se vi ne konas *Rememoroj pri Selferino* (de H. Dunant, traduko de A. Vaillant kaj P. Fruictier), skribu tuj al *Presa Soc.* por ĝin mendi. Per tiu libro vi konos la komencojn de la « Ruĝa Kruco », la mirindan homon, kiu elpensis tiun fundon, kaj la motivojn humanajn, kiuj lin kondukis al tiu bela ideo : vi fariĝos Pacifisto, kaj vi komprenos, ke ekzistas vera kaj dezirinda Pacifismo. — Mi ne povas same laŭdi la N-on 5 de l'sama *Libraro*. « Ili estis frenezaj » (de O. Mirbeau, trad. de L. Andrejev). La stilo estas... terura ! Jen specimenoj de kunmetitaj vortoj : « dentmalnaskanta » buŝo... « ruĝegruĝas »... Specimenoj de strangaj formoj « videblas »..., « po iam »..., « aŭdeblis »..., « volontulĉjo »..., « aliece »... Tio estas sufiĉa, ĉu ne ? — En la N-o 6, *Paco kaj Milito* (de Prof. Ch. Richet, trad. de D-ro Vallienne) ni retrovas belan stilon Esperantan;

ankaŭ en la verko de S-o G. Moch, tradukita de li mem : *Pri Malarmo : Ĥimeroj kaj Realajoj*.

En la kolekto *Paco-Libereco* aperis la broŝureto *Al la virinoj*, de Urbain Gohier; trad. Fi-Blan-Go.

Ni finos nian *kronikon* per katolika verko por blinduloj (la *unua*, ni pensas) : *Kristanaj Preĝoj por Blinduloj*, en Braille'a reliefo. La eldonistino estas F-ino Adria Tellini, filino de nia amiko, D-ro Tellini, Udine-San Rocco, Italujo. F-ino T. intencas daŭrigi sian sindonan laboron kaj publikigi libretojn de humoraĵoj, pensoj, fabeloj, ktp. Ni sincere komplimentas F-inon Tellini pro sia bonfara entrepreno.

E. LIME.

ŜAKOJ

(Sub la redakcio de S-o AL. WAGNER, STANISLAU, 2, Austrujo.)

El la ŝakmondo.

Ni ricevis funebran sciigon el Prago.

31. V, mortis subite tie D-ro *J. Dobrusky* la geniala problemkomponisto, unu el fondintoj de glora sistemo « la bohema lernejo ». Paco al lia animo !

LUDO XIV-a. — La komenco de damaj soldataj.

BLANKO	NIGRO	BLANKO	NIGRO.
D. Janowski	E. Schallopp	9. Ĉ × Ĉ	D — 5R (ŝ)
1. S — 4D	S — 4D	10. K — 3R	S × Ĉ
2. S — 4KD	S × S	11. Ĉ — 3K	D × S
3. Ĉ — 3KR	S — 4KD	Nun sekvas la tragikomika fino :	
4. S — 3R	S × S	12. K — 5D!	S × K
5. S × S	K — 5Ĉ Tre	13. D × S (ŝ)	R — 1D
malutila iro, kiun la sprita	bonege refutas.	14. D × T (ŝ)	R — 2D
gvidanto de B		15. D — 7Ĉ (ŝ)	R — 3R
6. K × S	S — 3R	16. D — 6K (ŝ)	K — 3D
7. D = 4T (ŝ)	Ĉ — 3KD	17. K — 4K	D × T (ŝ)
8. Ĉ — 5R	D × S	18. R — 2D	Cedas.

Jen la nomoj de la ĝisnunaj partoprenantoj en la unua koresponda ŝakturniro de *Espero Katolika*.

1. D-ro Gaston Maillard, Sceaux (Francujo).

2. Andr. Nissen, Kjobenhavn (Danujo).
- 3, 4. Anĝelo kaj Francisko fratroj, Novejaque, Valencio.
5. Antonio Esteban, Valencio.
6. Vicente Mestre, Valencio.
7. Ventura Vidal, Valencio.


DAUROTA.

Ni aranĝas unuan internacian korespondan ŝakturniron, kiu konsistos el unuopaj ŝakdueloj sur du ludoj. La venkintoj ambaŭflanke venos al batalo plimalvasta pro multaj kaj valoraj premioj. La partopreno estas senpaga. La tempo por pripensi estos tri tagoj post ricevo de ĉiufoja iro. La venkinto, respektive apud ludo nedecidata la gvidinto de la Blanko devas sendi korektan ludnoton al la ŝakredakcio. La ŝakredaktoro akceptas aliĝo ĝis 1 Sept. 1907.

Problemo XIV-a (Originala).

Komponis Anĝelo
Novejarque en Valencio.

Nigro 3 pecoj.



Blanko : 5 pecoj.

Blanko komencas kaj mortigas per la 3-a iro.

Solvo de problemo XII-a

(Rengaw.)

BLANKO	NIGRO
1. D — 6 K	R — 7R
2. D — 1K (ŝ)	R × D
3. Ĉ — 3Ĉ (ŝm)	

A

1...	1. S — 7R
2. Ĉ — 1R	2. R × Ĉ aŭ 8K
3. D — 1T (ŝm)	

B

1..	1. R — 7K
2. D — 2Ĉ +	2. R × Ĉ aŭ 8D
3. Ĉ — 5K resp. 3K (ŝm)	

Ĝuste solvis : W. W. Padfield, Ipswich (Anglujo), kaj J. Bušek, Benešov. La premion ricevis S-o *Jaroslav Bušek*, katecheta en Benesov (Bohemujo).

Le Gérant : L. MONTEMBault.

La Chapelle-Montligeon (Orne). — Imp. de Montligeon.

ANNALES DE PHILOSOPHIE CHRÉTIENNE (*Analoj de Filozofio Kristana*). — Direktoro Pastro Laberthonnière. Administracio : Librejo Bloud, 4, rue Madame, Paris ; abono jara : 20 fr. — 100 paĝoj monate. — La plej internacia, plej serioza, plej progresema revuo filozofia !

REVUE DU CLERGÉ FRANÇAIS (*Revuo de Franca Pastro*). — Redaktoro Pastro J. Bricout, 17, rue Fénelon. Administracio : Librejo Letouzey et Ané, 76 bis, rue des Saints-Pères, Paris. Jarabono : 23 fr. (En Francl. 20 fr.) 110 paĝoj duonmonate. Revuo tre progresema pri studoj pastraj. En ĝi kunlaboras la plej kleraj pastroj francaj.

JUNA ESPERANTISTO, monata gazeto por Junuloj, instruistoj, eklernantoj, abono : 2 fr. 50. — Ĉe Presa Esper. Societo, 33, rue Lacépède, Paris. — Specimeno senpage.

✧ **LE SOUVENIR**. Monata ĵurnalo literatura : 1 frank. Unuiĝo poŝta 1 fr. 50. Direktoro Fondatoro : XAVIER CASIER, Premiita de Akademio Reĝa de Bel-Artoj, membro de komitato de Unuiĝo de perioda Gazetistaro. B^d Anspach, 83, Bruxelles.

KOLEKTISTOJ : S-o, VARJU Endre, Budapest, IV, Kygio U-E 62, em, 14, kolektas k. interŝang. uzitajn poŝtm.

INSTITUTO DE MODERNAJ LINGVOJ

ANGLA, FRANCA, GERMANA, INTERNACIA

La Sinjoroj dezirantaj ellerni unu el la supraj lingvoj estas petataj skribi por pluaj sciigoj al la Direktoro

S-o J. A. THILL, BARTON CRESCENT, PLYMOUTH, ANGLUJO

NE PLI OL KVAR LERNANTOJ ESTOS

AKCEPTAJAJ SAMTEMPE

(10)

PENSIO POR GESINJOROJ GENEVO. — S-ino RISER, 4, rue de Candolle. — Moderaj prezoj. Hejma vivado. Oni parolas en Esperanto.

FONTAN-PLUMINGO « FACULTY ». — Ni esperas plaĉi al niaj legantoj vendante al ili tiun bonegan « Skribilon ». La « Fontan-Plumingo », aŭ plumingo kiuj enhavas inkon, estas ordinare tre multekostaj (10 aŭ 12 fr.). Post konsento kun vendisto ni povas liveri la « Faculty » plumingon por la nekredebla prezo de 3 fr. 75 (prenota en nia Oficejo), aŭ 3 fr. 90 a frankite kaj rekomendite.

JUS APERIS : *Hebrea Kalendaro*, de Pastro Jakobo BIANCHINI. (Malmultaj ekzempleroj. *Rapidu mendi.*) 0 fr. 20

LES LANGUES VIVANTES (*La Vivaj Lingvoj*). Angla, Germana, Itala, Hispana, Franca, kaj Esperanta. Ilustrita Revuo duonmonata. — Publikigas kurson pri Esperanto de P-o Em. Peltier. Eldonita de Pariza firmo Bloud.

Abonoj :	PLENA REVUO	3 LINGVOJ	2 LINGVOJ	1 LINGVO
Francl.	7 fr. 50	6 fr.	4 fr. 50	3 fr.
Eskter Fr.	9 fr. 50	7 fr.	5 fr. 50	4 fr.

Oni abonas ĉe la Direktoro de E. K. — Specimenon senpage.

LA REVUO. — Internacia monata literatura gazeto, kun konstanta kunlaborado de D^o ZAMENHOF. — Ĉe Hachette k. K^o Paris. — Jare, Francujo : Fr. 6 ; ceteraj landoj : Fr. 7.

LINGVO INTERNACIA, centra organo de la Esperantistoj, la plej malnova gazeto (1895), eliras nun la 15-an de ĉiu monato. Abono 5 fr. — Kun Literatura Aldono 7 fr. 50. Specimeno senpage. — Presa Esper. Societo, 33, rue Lacépède, Paris.

ESPERO PACIFISTA, MONATA ORGANO DE LA SOCIETO POR LA PACO, abono 5 fr. kun aliĝo al la Societo kaj ricevo de la aldonoj.

Ŝ-ro Gaston Moch, 26, rue de Chartres, Neuilly-sur-Seine (Francujo).

« **TRA LA MONDO** » (*Tutmonda multilustrata revuo esperanta*). — Nuntempaĵoj ; arto, literaturo, sciencoj ; komerco ; industrio ; militistaro, maristaro ; teatro ; sportoj ; virina kaj gejunula paĝo ; felietono ; ludoj, konkursoj kun valoraj monaj premioj. — Jare : 8 fr. kvaronjare : 2 fr. 25. — Turnu vin : 15, boulevard des Deux-Gares, Meudon (S.-et-M.), France, aŭ al la Direktoro de E. K.

Abono sen pluaj elspezoj en francaj poŝtoŝtupoj.

Pri unu speco de kurbaj linioj, koncernantaj la V-an Eŭklidan postulaton. Verkis Profesoro A. DOMBROVSKI (2-a eldon.) 0 fr. 65

Pri novaj trigonometriaj sistemoj. Originale verkis Prof. A. DOMBROVSKI 1 fr. 80
(Aĉeteblaj *po-grande* nur ĉe la Direktoro de E. K.)

PREĜARO. Tri kajeroj, kies unua jus aperis (por la subskribintoj) 3 fr. »
Unua kajero (por ne subskribintoj). 2 fr. 50